# La domo de Jules Verne

En 1882, Jules Verne kaj lia edzino, Honorine, instaliĝas en tiu domo ĉe angulo de la strato Charles Dubois kaj la bulvardo Longueville. Ili luprenas tiun domon ĝis 1900. Jules Verne estas 54-jara, li estas ĉe kulmino de sia gloro. La domo estas granda kaj enhavas teretaĝon kaj du etaĝojn, larĝan subtegmenton kaj turon kun belvedero. La kuirejo, aneksaĵo kaj la staloj okupas la grandan maldekstran alon de la konstruaĵo (nuntempe la akceptejo).

Kiel la aliaj najbaraj domoj, la «domo kun la turo» estas konstruita per ruĝaj brikoj, farbitaj rozkolore ĉe la strato kaj kun helaj junktoj ĉe la korto. La linteloj, la kornicoj kaj la fenestraj bretoj estas el kalka ŝtono. Granda ĝardeno, kiu plilongigis la nunan korton, malaperis en la jaroj 1970.

La unua etaĝo de la domo estis destinita al la dormoĉambroj, kiuj estis atingitaj per la helika ŝtuparo de la turo. La laborĉambro de la verkisto estis ĉe la dua etaĝo, ĉe angulo de la konstruaĵo.

## Kelkaj datoj pri tiu domo

**1854-1858 >** Konstruo de la domo por la notario Jean-Baptiste-Gustave Riquier.

**1882-1900 >** Periodo dum kiu loĝis tie Jules Verne.

**1980 >** La urbo Amieno akiras la domon.

**1987 >** Transforma laboro komenciĝas ĉe la teretaĝo.

**1988 >** La Unua malfermo de la muzeo ĉe la teretaĝo.

**1998 >** Enskribo al la Suplementa Inventaro de Historiaj Monumentoj.

**2000 >** Amieno Métropole akiras la kolekton Piero Gondolo della Riva
(30 000 dokumentoj kaj objektoj).

**2004 >** Amieno Métropole preparas dosieron de kompleta rehabilito de la Domo.

**Avril 2005 >** Komenco de la laboro.

**24 mars 2006 >** Remalfermo al la publiko.

© Maison de Jules Verne 2020

# Vivo kaj verkaro de Jules Verne

**1828, la 8-an de februoro**, naskiĝo de Jules Verne en Nantes, filo de Pierre Verne, proceduristo, kaj de Sophie Allotte de La Fuÿe.
**1837-1847,** li studas en Nantes (Saint-Stanislas, Katolika mezlernejo kaj Reĝa Kolegio).
**1846,** abituriento pri literaturo
**1848,** abituriento pri juro, li instalas sin en Parizo por fini siajn studojn. Licenciulo pri juro en 1850, li rifuzas sukcedi sian patron en Nantes.
**1848-1856,** Jules Verne vizitadas la literaturan kaj teatran mondon de Parizo. Lia teatraĵo «Les pailles rompues», skribita kunlabore kun Alexandre Dumas filo, estas prezentita en 1850 ĉe Théâtre historique, kiu apartenis al Dumas patro.
**1852-1854,** Jules Verne estas sekretario de Théâtre lyrique, eksa Théâtre historique.
1851-1855, Jules Verne publikigas siajn unuajn rakontojn en la revuo «Musée des familles». Li plu skribas komediojn, kiuj estas prezentataj en parizaj teatroj.
**1856**, Jules Verne ĉeestas en Amieno la edziĝon de sia amiko Auguste Lelarge kun Aimée Deviane ; li enamiĝas al ŝia fratino, Honorine.
**1857,** geedziĝo kun Honorine Deviane. Jules Verne iĝas kambiisto en Parizo.
**1861**, vojaĝo al Skandinavio; naskiĝo de lia sola filo Michel la 3-an de aŭgusto.
**1862**, post kelkaj provoj ĉe diversaj parizaj eldonistoj, Jules Verne renkontas Pierre-Jules Hetzel, kiu fariĝos lia sola eldonisto.
**1863,** publikigado de la unua romano de Jules Verne : ***Kvin semajnoj en aerbalono***.
**1864**, Hetzel fondas la «Magasin d'Éducation et de Récréation », kiu publikigos, ekde ties unua numero, la plej multon de la verkoj de Jules Verne.
**1864-1868**, apero de ***Vojaĝo al la Centro de la Tero, De Tero al Luno, Vojaĝoj kaj aventuroj de Kapitano Hatteras,*** kaj de ***La Geinfanoj de Kapitano Grant***. Ĉiuj romanoj, kaj la sekvaj, estos kunigitaj ekde 1866 en la serio de La Eksterordinaraj vojaĝoj.
**1867**, vojaĝo al Novjorko sur la transatlantika ŝipo Great Eastern.
**1868**, Jules Verne aĉetas sian unuan ŝipeton, «Saint-Michel», ĉe Le Crotoy, kie li instaliĝas en 1869.
**1869-1870**, Publikigo de ***Dudek mil leŭgoj sub la maroj***.
**1871**, Jules Verne instalas sin en Amieno, kie li poste aĉetas la domon ĉe 44 Bulvardo Longueville (nun bulvardo Jules Verne).
**1872,** apero felietone en ĉiutaga gazeto « Le temps» de la romano ***Ĉirkaŭ la mondo dum 80 tagoj.***
**1874**, triumfo de la teatraĵo farita de Adolphe d'Ennery kaj Jules Verne, eltirita el tiu lasta romano.
**1876**, publikigo de la romano Michel Strogoff. Jules Verne konstruigas sian duan ŝipeton, «Saint-Michel II».
**1878**, krozado de Jules Verne laŭlonge la atlantikan marbordon (Hispanio kaj Portugalio) kaj en Nord-Afriko sur la « Saint-Michel III » luksa velvaporŝipo aĉetita en 1877.
**1882,** Jules Verne forlasas sian domon ĉe Bulvardo Longueville kaj instaliĝas en la "domo kun la turo", ĉe 2, strato Charles Dubois.
**1885,** vendo de la «Saint Michel III» pro f**inancaj malfacilaĵoj.**
**1886, la 9-an de marto**, Jules Verne estas viktimo de atenco, kies aŭtoro estas lia nevo Gaston. **La 17-an de marto**, lia eldonisto mortas.
**1888,** Jules Verne estas elektita al la Magistrato de Amieno.
**1898-1904**, Jules Verne skribas siajn lastajn romanojn, multaj el ili estos reskribitaj kaj publikigitaj de lia filo post lia morto.
**1900,** Jules Verne forlasas la luprenitan domon ĉe strato Charles Dubois kaj revenas en sian domon ĉe bulvardo Longueville.
**1905, la 24-an marto,** morto de Jules Verne en Amieno. Li estas entombigita en la amiena tombejo La Madeleine.

© Maison de Jules Verne 2020

# La teretaĝo

En tiu domo de la mezo de la deknaŭa jarcento, la teretaĝo plejparte konservis sian originan dekoracion. Estas la etaĝo de la domo, kiu malplej ŝanĝiĝis post la foriro de Jules Verne.

## 1 La vintra ĝardeno

La vintra ĝardeno estas hela spaco, kies larĝaj vitrotegmentoj ebligas vidi la turon de la domo. La ĉinaj teleroj kaj potaĵoj, kiuj ornamas la murojn, kaj ankaŭ la plantoj, karaterizas la inklinon por la ekzotismo de la 19a jarcento.

## 2 La manĝoĉambro

La manĝoĉambro estas la sola ĉambro de la domo, kiu konservis sian originan dekoracion kun ĝia plafono kun kasonoj. La mebloj de tiu ceremonia manĝoĉambro, kiu estis uzata nur por specialaj okazoj, estis restarigita laŭ la neo-gotika stilo. En la murŝrankoj, kelkaj objektoj, kiujn vi malkovras, apartenis al Jules Verne kaj al lia edzino.

## 3 La granda salono aŭ muziksalono

Honorine Verne regule organizis vesperkunvenojn kun amikoj. La grandaj portretoj reprezentas Jules Verne kaj lian edzinon Honorine. Ambaŭflanke de la kameno pendas fotoj de la familio Verne, interalie de la gepatroj de la verkisto.
Pierre kaj Sophie Verne havis kvin infanojn, du filojn, Jules en 1828, tuj poste Paul en 1829, kaj ok jarojn poste, tri filinojn, Anna, Mathilde kaj Marie. La portreto de Marie Verne pendas sur muro de la ĉambro.

## 4 La malgranda salono nomata la fumejo

En ĉi tiu salono estas arigitaj fotografaĵoj de Jules kaj Honorine Verne.
La montrofenestroj elvokas la studojn de Jules Verne kaj liajn legaĵojn de junaĝo, aparte rakontojn de Robinsono.

## 5 La literaturaj komencoj de Jules Verne

Ĉi ĉambro elvokas kaj la komencojn de Jules Verne pri teatro kaj fikciaj rakontoj publikigitaj en la revuo *La muzeo de la familioj* (Le Musée des familles ) kaj ankaŭ liajn vojaĝojn, interalie lian periplon sur la « Great-Eastern», la plej granda transatlantika ŝipo de tiu epoko. Kun sia frato Paul, Jules Verne veturis al Usono en marto 1867; li vizitis Novjorkon kaj la akvofalojn de Niagara. Tiu vojaĝo sugestis al li la romanon *Flosanta Urbo (Une ville flottante)*.

Utiligu la helikan ŝtuparon por supreniri.

© Maison de Jules Verne 2020

# La unua etaĝo

Je la unua etaĝo de tiu domo estis la dormoĉambroj de la familio Verne. Anstataŭe, ĉi-tie, estas restarigitaj la pariza librovendejo kaj la laborĉambro de la eldonisto Pierre-Jules Hetzel.

Naskita en Chartres en 1814, Pierre-Jules Hetzel fariĝis eldonisto en 1836. Fervora respublikano, li donis prioritaton al eldonoj por la junularo kaj lanĉis en 1864 *La revuon Magazeno pri edukado kaj distrado (le Magasin d'éducation et de récréation)*. La nova apero en 1865 de *Kvin semajnoj en aerobalono* malfermas la serion de *La Eksterordinaraj vojaĝoj*.

La historioj de tiuj du homoj estas intime ligitaj. Por Jules Verne, Hetzel estis kaj inspiranto, kaj cenzuranto, kaj moraliganto. La eldonisto metis la verkojn de Jules Verne en sian programon "Edukado kaj distrado".

## 6 La librovendejo Hetzel

Pierre-Jules Hetzel unue publikigas la verkojn de Jules Verne felietone en la revuo *Magazeno pri edukado kaj distrado*, kaj poste en malgranda formato en broŝura eldono.
*La Eksterordinaraj vojaĝoj* estas ĉefe konataj en sia granda formato (28 x 20 cm) kaj prezentataj en belegaj kartonaĵoj.
Oni nombras pli ol dudek malsamajn kartonaĵojn por *La Eksterordinaraj vojaĝoj*. Nur la verko de Jules Verne estis abunde publikigita. Ties populareco estas kompreneble ligita al la mirinda sukceso de la romanoj de Jules Verne. Tio estas ankaŭ ligita al la estetikaj kvalitecoj de la ornamaĵoj elektitaj de Hetzel. La eldonisto zorgeme evoluigis la ornamaĵojn por pli bone kontentigi la ŝanĝantan guston de la publiko.

## 7 Ĉambro dediĉita al provizoraj ekspozicioj

## 8 La oficejo Hetzel

Tiu granda ĉambro prezentas restarigon de la oficejo de Pierre-Jules Hetzel. Ĝi enhavas ties objektojn, interalie la fotelon el la salono de lia laborĉambro ĉe 18, strato Jacob en Parizo. Estas ankaŭ la dosieromeblo enhavanta la slipojn de la privata biblioteko de Hetzel, ĝisdatigitajn ĝis la jaroj 1950.
Eblas vidi sur gravuraĵo ĉe la enirejo de la ĉambro la originan aranĝon de la oficejo de Hetzel. Sur la muro estas fotografaĵoj de la familio.

## 8 La vivo de Jules Verne en Amieno

La alia parto de la ĉambro estas dediĉita al la vivo de Jules Verne en Amieno. Jules Verne instaliĝis en Amieno en 1871 por alproksimiĝi al sia bofamilio. En 1873, li aĉetis domon ĉe 44 bulvardo Longueville (nun bulvardo Jules Verne). En 1882, li forlasis tiun domon kaj luprenis la domon kun turo ĝis 1900. Sed li mortis en la domo Nr. 44, la 24-an de marto 1905. Ekde 1872, Jules Verne partoprenis en la loka vivo. Li estis interalie membro de la Amiena Akademio, de la Industria Socio, de la Hortikultura Socio, administranto de la banko Caisse d'Epargne, kaj, ĉefe, Jules Verne, estis elektita magistratano por 16 jaroj (1888-1904). Estiel magistratano, li eldiris multajn paroladojn interalie por la inaŭguro de la cirko, la 24-an de junio 1889.

Dankon reutiligi la saman ŝtuparon supren por daŭrigi la viziton ĉe la dua etaĝo.

© Maison de Jules Verne 2020

# La dua etaĝo

Post ĉirkaŭiro en la mara mondo de Jules Verne, vi malkovros lian laborspacon, inter fontoj de inspiro kaj skriba kabineto.

## 9 Naŭtikaj vojaĝoj

Bonvenon sur la ŝipon Saint-Michel III de Jules Verne. Tiu rekonstruo ebligas al vi malkovri la internon de jakto de la dua duono de la 19a jarcento. La kajuto donas vidon al Le Crotoy, kie, de 1865 ĝis 1869 Jules Verne luas duan hejmon nomatan *La Soleco*. Sur la skribotablo prezentita sur foto, Jules Verne komencas la redakton de *Dudek mil leŭgoj sub la maroj* en 1869.

## 10 La biblioteko

Sur ĉi tiu etaĝo, Jules Verne posedis bibliotekon kun ĉirkaŭ 12.000 verkoj, kiujn li konsultis por la skribado de siaj romanoj. La plej ofte konsultitaj verkoj estas tiuj de Homero, Montaigne, Shakespeare, Cooper, Dickens, Walter Scott, Edgar Poe...

## 11 La kabineto de laboro

Jules Verne skribas siajn romanojn en la plej malgranda ĉambro de la domo. Tie, inter la 5a kaj 11a horoj, li naskas pli ol tridek romanojn inkluzive de *Mathias Sandorf*, *Du jarojn da ferioj* kaj *La Kastelo de la Karpatoj*. Iom da silento kaj ni povus aŭdi Jules Verne skribi novan eksterordinaran vojaĝon! La kabineto estas identa rekonstruo de la epoko de Jules Verne, kun fera paŭzolito, leda brakseĝo kaj skribotablo. La terglobo sur la skribotablo apartenis al Jules Verne.

## 12 Ĉirkaŭ la mondo dum 80 tagoj

Estas la okazo sekvi la fontojn de inspiro de Jules Verne; sed ankaŭ promeni sur mondmapo senpere desegnita sur planko. Sur tiu mapo, Jules Verne nigre desegnis vojiron de aera rondmondo imagita por lia romano *Robur-la-konkeranto*. La strekoj reprezentas la diversajn modifojn faritajn de la aŭtoro.
Skribita en 1872 fare de Jules Verne, *Ĉirkaŭ la Mondo dum 80 tagoj* restas la plej tradukita franca romano en la mondo. Jam dum la vivo de la aŭtoro, tiu historio naskis multajn artefaktojn. Estas montritaj ĉi tie lotoludoj kaj anserludo, figuretoj, serio de deserplatoj, kolektaj bildoj kaj eĉ tapetpapero inspirita de la romano.

## 13 Dudek mil leŭgoj sub la maroj

La Universala Ekspozicio de Parizo de 1867 inspiris al Jules Verne tiun submaran temon. La lastatempaj eksperimentoj de la unuaj submarŝipoj kaj la evoluo de skafandroj estas reliefigataj. La ideo skribi romanon pri tiu temo estis sugestita de George Sand post kiam ŝi legis siajn unuajn romanojn.

Por daŭrigi vian viziton prenu, la spiralŝtuparon situantan en la loko Dudek mil leŭgoj sub la maroj.

© Maison de Jules Verne 2020

# La subtegmento de Jules Verne

La subtegmento estas spaco, kie niaj memoroj akumuliĝas en sinsekvaj tavoloj. La forlasitaj objektoj konserviĝas tie. Familia subtegmento kun kofroj de memoraĵoj, de malnovaj fotoj, neuzataj ludoj, magiaj lanternoj, afiŝoj ... la subtegmento de Jules Verne estas ankaŭ tiu de la sinsekvaj vivoj de liaj romanoj, ekde ilia naskiĝo ĝis nia epoko.

*La memoraĵoj de pasintaj tempoj ...*

Afiŝoj pri kinarto, vera filma klapo, marionetaj teatroj, modeloj, ĉio ĉi instigas nin daŭrigi la revon ...

14 **Eksterordinaraj maŝinoj**

Ĉe la plafono estas alkroĉitaj flugmaŝinoj imagitaj de Jules Verne. *L'Albatros* (La Albatroso), la *Go Ahead* (Antaŭen) kaj *l'Epouvante* (la Hororo) apartenas al la du romanoj *Robur-la-Konkeranto* kaj *Mastro de la Mondo*.

14 **Jules Verne kaj teatro**


Teatro estis unu el la pasioj de Jules Verne. La spektakloriĉaj teatraĵoj de Châtelet kaj Porte Saint-Martin same kiel la teatro por marionetoj revigligis, antaŭ la kinejo kaj dum pluraj generacioj, la revojn de aventuro kaj fantazio de lia tempo.

14 **Jules Verne faras sian kinon**

Pli ol 200 filmoj surbaze de 35 romanoj kaj rakontoj de Jules Verne estis produktitaj inter 1901 kaj 2006. La odiseo de la kapitano Nemo en *Dudek mil leŭgoj sub la maroj* estis la plej populara aventuro. Tridek unu filmoj estis inspiritaj de ĝi, multe pli ol la 24 filmoj de *Ĉirkaŭ la mondo dum 80 tagoj* kaj la 23 adaptaĵoj *de Michel Strogoff*.

Tiel finiĝas via eksterordinara vojaĝo tra la ĉiutaga vivo kaj la kreema universo de Jules Verne.

Por reveni al la teretaĝo, bonvolu preni la spiralŝtuparon situantan en la turo.



© Maison de Jules Verne 2020

# Jules Verne kaj Esperanto

***«Nautron respoc lorni virch.»*** Tute ne estas frazo en praesperanto, sed frazo de kapitano Nemo inventita de Jules Verne en lia plej fama romano. Neniu, ĝis nun, scias kion tio signifas; la verkisto, en siaj romanoj, ŝatas krei vortojn, kiuj surprizas, kiuj invitas al aventuro, kaj vekas scivolemon.

En 1869, do en tiu romano *Dudek mil leŭgoj sub la maroj*, kapitano Nemo kaj lia skipo utiligas idiomon «sonan, harmonian, fleksan» (ĉapitro VIII). Kaj en la sama ĉapitro venas la vera opinio de Jules Verne pri lingvoj el la buŝo de la asistanto de profesoro Aronnax (prononci aronaks) : jen la malagrabla flanko ne scii ĉiujn lingvojn aŭ la malavantaĝo ne havi unikan lingvon!

En januaro 1903 naskiĝas la unua asocio de esperantistoj en Amiens «Grupo Esperantista Amiens». Charles Tassencourt, negocisto kaj konsula agento por Usono, estas ties prezidanto, kaj li ankaŭ estas amiko de Jules Verne. Tial Charles Tassencourt kun Joseph Delfour, ankaŭ konato de Verne, proponas al la verkisto iĝi honora prezidanto de la loka asocio. La verkisto entuziasme akceptas kaj promesas verki romanon, kiu pritraktos la temon Esperanto. Kiam?

Danke al la monata gazeto Lingvo Internacia, ni scias, ke la verkisto komencis skribi en la unuaj semajnoj de 1903. Kaj la aludita verko titoliĝas *Voyage d'études* (*Esplorvojaĝo* – traduko de István Ertl aperinta en la revuo Franca Esperantisto n-ro 452 aprilo 1994). Bedaŭrinde, Jules Verne verkis nur parton de tiu romano (ĝis komenco de la kvina ĉapitro). Interalie, en ĝi, li komparas Volapukon kun Esperanto. Kaj lia konkludo estas finofara: Volapuko ne estas vivipova lingvo. Male, pri Esperanto Jules Verne skribis en la romano: Esperanto estas la plej certa, la plej rapida vehiklo de la civilizacio! Estas rimarkinde, unue, ke Esperanto estas simpla, fleksebla, belsona lingvo, (kiel la lingvo de kapitano Nemo!), kiu taŭgas same por eleganta prozo, kiel por harmoniaj versoj. Ĝi kapablas esprimis ĉiujn pensojn kaj eĉ la plej delikatajn sentojn de la animo. Krome, pro siaj elementoj, ĝi estas la ideala internacia lingvo.

© Maison de Jules Verne 2020

La precipa ideo, kiu gvidis ĝian kreadon, estis elekti la radikojn proporcie al ilia internacieco, kvazaŭ per universala voĉdonado. Laŭ lingvistika vidpunkto, Esperanto, vivanta lingvo de komunumo dissemita sur la kvin kontinentoj, estas plia inventaĵo, kiun fidis Jules Verne. Unika modelo de sukcesa plan-lingvo, Esperanto malrapide sed senĉese daŭre disvastiĝas danke al inventaĵo de la dudeka jarcento, tutmonda interreto. Refoje Jules Verne ĝuste imagis pri la lingvo internacia, kapabla unuigi la homaron.

Per trajno, la 3an de aŭgusto 1905, Zamenhof pasas tra Amiens, kaj veturas al Bulonjo ĉe Maro, kie okazos la unua tre grava universala kongreso. La 12an de aŭgusto, revenante al Parizo, Zamenhof sukcesis aranĝi por si privatan tempon en la regiono de Amiens. Li ne povis renkonti Jules Verne, sed eble li iris al la domo de Jules Verne kaj al la tombejo por honori lian memoron. Kaj ĉiuj esperantistoj en la mondo scias pri Jules Verne kaj honoras lian memoron.



***Traduko de la Gvidlibreto por la vizito de la domo de Jules Verne far la loka asocio Esperanto 80 - junio 2019***

**© Maison de Jules Verne 2020**